


# AUGUSTE BROISE

## (1901-1974)

Neatendite nia kara franca kolego Inĝ. A.Broise,la direktoro de Termdnologia Centro de ISAE (kaj la delegito) forpasis la 12-an de julio 1974.

Li naskiĝis la 29-an de oktobro 1901 en AULT (Somme), plenumis en 1917 la abiturientan ekzamenon ĉe la gimnazio de LORIENT kaj unue laboris en diversaj ŝtataj oficejoj, plej ofte kiel militista mapodesegnisto, preparante sin samtempe por la ekzameno al la kariero de ŝtata ŝose-konstrua inĝeniero, kiun li plenumis en 1926. Kiel inĝeniero de la franca ŝose-konstrua administracio Broise laboris en diversaj urboj,fine en Brezolles, kie li finis en 1966 sian karieron, por fariĝi pensiulo en Nonancourt (Eure).

Jam kiel juna inĝeniero B. prefere studadis plurajn lingvojn kaj flue parolis kaj skribis kvar el ili. Tuj post la dua milito li denove okupiĝis pri Esperanto, kiun li estis lernninta jam dudek jarojn antaŭe, kaj aliĝis ISAE'n, por helpi enkonduki la Internacian Lingvon en Scienco kaj Tekniko. Unue li preparis fakvortaron pri sia propra fako,kaj en 1959 lia "Teknika Terminaro pri Ŝoseoj kaj Pontoj" aperis en la dua parto de la UEA-jarlibro. De tiam li celis verki kompletan Ilmaŝinan Terminaron kaj okupis en la Terminologia Sekcio de ISAE eminentan postenon kiel nelaciĝebla kontrolanto de fakvortaraj malnetoj. Ĉiam klopodante antaŭenigi la teknikan vortotrezoron, li distingiĝis pro sia agemo, sagaceco kaj kritikemo. Pro tio li fariĝis ankaŭ la plej grava kunlaboranto de s-ano R.Eichholz (Kanado), la iniciatinto de "Slipara Vortaro (SV)" kaj la tradukado de "Duden-Bildvortaro".

Kiam dipl.inĝ. R.Haferkorn pro progresinta aĝo kaj la malforta stato de sia sano decidis demisii el sia posteno kiel Direktoro de la TC de ISAE, kiu estas ligita kun tiu de la Sekcio pri Teknikaj Vortaroj de Akademio de Esperanto, li proponis inĝ. Broise kiel sian sekvonton. B. membriĝis en Akademio de Esperanto kaj pro tio estis eble al li, preni sur sin en 1970 tiun duopan gravan postenon. De tiam lia ĉefa klopodo estis, starigi "Fakterminologiajn Komisionojn (FTK)", kiuj havu la taskon, liveri al la Terminologia Centro, tiu kontrolada instanco,fidindan materialon por antaŭenigi la Teknikan Terminaron. Lia fervoro kaj zorgemo estis admirindaj. Estas mirige, kiel ĝisfunde li kutimiĝis en ĉiujn specojn de teknikaj-sciencaj fakoj, ekz-e en fizikon kaj matematikon, kaj kun kia entuziasmo li plugis la teknikan kampon terminologian. Por la Teknika Terminologia Sekcio la forpaso de inĝ. Broise estas perdo preskaŭ nekompensebla. Ni ĉiuj ŝatis lin kiel fidindan kunlaboranton kaj helpeman amikon, kaj ni ĉiam ankoraŭ fidele lin memoros.

R. Haferkorn